In 1980 Silvia Rottenberg came across a newspaper announcement about an Esperanto course that was being offered. She enrolled in the course and studied for a year. Her timing was perfect. The very next year the 66th *Universala Kongreso de Esperanto* was held in Brasília, the capital of the neighboring country Brazil where Portuguese is the national language. 1,749 Esperantists attended. They came from countries all over the world. After just one year of study, with just a fraction of the time and effort that she had put into English with very meager results, Silvia Rottenberg found herself carrying on conversations with Japanese, Chinese, Finns, Americans, Africans and people from many other countries. This was a very moving experience for her. Silvia Rottenberg's dream had come true.

She has visited the United States a number of times. She has spent a total of a month as a guest of two different families in New York City. She has taken part in the three week course at San Francisco State University, a course that attracts students from various parts of the world. When her son-in-law was studying at Michigan State University in East Lansing she paid visits there to be with her daughter, her son-in-law and her grandchildren. Silvia Rottenberg still does not speak English but she carried on fluent conversations with Esperantists in these different parts of the United States.

She has also used Esperanto overseas. Once on a

visit to Israel where her niece was getting married she had a free morning to spend in Jerusalem. She found the name and phone number of Matilde Landau in the *Pasporta Servo*, and she made a phone call. Matilde Landau had the morning free. Within a half hour the two women met at an agreed-on corner and the Israeli Esperantist greeted Silvia like an old friend and showed her around the city. Silvia had a similar experience in Madrid where she was met by a local Esperantist whose name she found in the *Jarlibro de Esperanto*, and she was shown the sights of the city including the Prado Museum. Obviously there was no language problem in Madrid because Spanish is the national language of both Spain and Argentina, but even there Esperanto proved valuable as an entrée to a local family.

In 1997 Silvia flew to San Francisco to take part in the Esperanto courses there. When she arrived at the airport, five Esperantists with a little Esperanto flag were waiting for her. There in a foreign city where she knew nobody, people she could converse with were waiting for her. She found this very moving.

She enjoyed the San Francisco course very much. One of her teachers was the Australian, Trevor Steele, whom she acclaims as an outstanding teacher. Trevor Steele is one of the outstanding fiction writers in Esperanto today. His great novel, *Sed Nur Fragmento*, deals with the conflict between rationalism and mysticism as played out in the experiences of a nineteenth century Russian explorer and intellectual in New Guinea, southeast Asia and Australia. In the course taught by Trevor Steele they read and discussed the stories in Claude Piron's *Vere aŭ Fantazie*. They read four stories a day.

Silvia Rottenberg serves as president of the Argentina Esperanto-Ligo. She has taught courses in Esperanto and her teaching has been the subject of a fine article in a Buenos Aires newspaper. She has put her name and address in the *Pasporta Servo*, the book that lists hundreds of Esperantists around the world who open their homes to visiting Esperantists. Her guests have included visitors from Brazil, Cuba, Estonia, France, Japan, Germany, the Netherlands, Norway and New Zealand. She has been able to carry on conversations with people from all over the world, most of whom do not speak Spanish, in her own home. This is another way in which her dream has come true.

In the mid nineties a Jewish University in Buenos Aires invited the famous Italian philosopher and novelist Umberto Eco to visit. Eco specializes in semiotics, a branch of philosophy that deals with the study of signs and symbols. He is most famous in this country for his medieval detective novel which has been translated into English as *The Name of the Rose*. He is best known among Esperantists for his book *The Search for the Perfect Language* which has been translated into several languages including Esperanto.

As the president of the Esperanto League of Argentina Silvia Rottenberg attended a press conference which Eco held. She asked him to give his opinion about Esperanto. He answered by saying that he had written an important book that deals with Esperanto and asked her if she had read it.

Rottenberg told him that the book (*The Search for the Perfect Language*) had not yet made it into Buenos Aires bookstores.

Then he answered her question. He said that he had a very high opinion of Esperanto. It had not succeeded so far because of the egoism of governments but the time might come when it would succeed due to the egoism of governments. By that he seemed to mean that when countries woke up to find that the language of another country was dominant over theirs they might finally work to adopt the neutral language Esperanto for international use, thus creating a level playing field.

If the day arrives when this happens then none of us will have trouble holding conversations with people all over the world.

<http://esperujo.ctw.net/fundamente/auskultu.htm>

This www address leads to sites where you can hear Esperanto on the web. This leads to a very useful site for intermediate students:

<http://www.esperanto.org/literaturo/RealAudio/>

There are currently twelve selections, all read very clearly, from authors such as Auld and Baghy, Poe and Tolkien.

You can download the texts and read along while you listen in streaming audio. Later, after you have become more familiar with the material, you can practice listening without the texts.

You can also download the sound files so you can play them when you are not online.

Internacia manpremo

de Gigi Harabagiu

Reading *Internacia Manpremo* reminded Gigi Harabagiu of an international handshake from long ago when she first came to the United States. In order to understand this fascinating little story please remember that back then the American dollar had about ten times its present value.

Mi enmigris Usonon en iu Vendreda vespero, ĝuste kiam okazis la Esperanto-kunveno en Nov-Jorko. Memkompreneble, mi deziris partopreni ĉi-tiun kunvenon. Mia unua Usona korespondanto Ralf Bonesper kondukis min tien.

Ĉiuj varme akceptis min kaj scivolis pri la lando el kiu mi eskapis, Rumanio. Sinjoroj Josefo Delpino kaj Grossu proponis promenigi min tra la urbo. Alia maljuna sinjoro (aspektanta neriĉa) Benjamin Reich volis nepre renkonti min Dimanĉe matene. Kun bedaŭro mi devis rifuzi al li pro la fakto, ke mi jam promesis tiun tagon al sinjoro John Futran kaj fraŭlino Lescher.

Tamen Dimanĉe matene, kiam mi estis preta forlasi la hejmon de miaj gastigantoj, eksonoris surpriza telefonvoko de s-ro Reich, kiu diris: "Mi troviĝas ĉi tie en Brooklyn kaj atendas vin en la subtera vagonarhaltejo. Mi scias ke vi ne havas tempon, sed mi retenos vin nur minuton."

Kiam mi eniris en la stacion, s-ro Reich alproksimiĝis kaj manpremis min, delikate enŝovinte al mi monbileton je \$100. Kompreninte lian geston, mi tuj retiris mian manon. Tiam s-ro Reich per ĝentila voĉo diris: "Sinjorino, vi alvenis en fremdan landon, vi estas veturonta al Cleveland, kie vi konas nenium. Povos okazi, ke vi ne tuj trovos laboron. Se vi ne volas akcepti mian donacon, tiam konsideru ĉi-tiun sumon kiel pruntedonon."

Ĝis fine mi rifuzis akcepti lian afablan oferon. Ni disiĝis amike, kaj mi neniam forgesos la bonkorecon de tiu samideano.

Post kelkaj jaroj reveninte al Nov-Jorko mi eksciis, ke s-ro Reich estis malsana, do mi kun s-ro Delpino vizitis lin en hospitalo en Brooklyn.

Tio estas la Esperanta solidareco. Ĉiujare foliumante la membro-liston de ELNA, mi rimarkas la nomon Benjamin W. Reich – dumviva membro. Multfoje mi pensas skribi al li, sed mi estas prokrastema. Eble li ne plu vivas: li ja estis maljuna kaj grave malsana tiam antaŭ 36 jaroj.

Manpremon tian mi ricevis unuafoje enpaŝinte Usonon....

PROPAEDEUTIC CLARINET

In shopping around for a new clarinet in the key of G or C, I had an interesting exchange of ideas with the inventor of a new style of clarinet. On his website www.firstclarinet.com Graham Lyons claims that "I was a woodwind teacher for 20 years and became very frustrated seeing countless children struggling with an instrument which was too big and heavy for them. It was obvious that they would learn faster with a lighter, smaller clarinet, and enjoy playing it more... [After learning the Lyons C clarinet] they could go on to any instrument and learn it very quickly having had the advantage of a number of years of instrumental training. But even if they buy a B-flat clarinet, there's no need to throw away their Lyons C clarinet. There's plenty of use for it." The parallels to the propaedeutic value of Esperanto were deep and obvious. So I sent Lyons a personal e-mail message in which I asked "Are you aware of the parallels of your project to aspects of the Esperanto language campaign? We are now emphasizing the propaedeutic value of studying Esperanto. Students have a devil of a time mastering the intricacies of (say) French grammar; many students fail and most develop at least something of a bad attitude toward language-learning. However, students who are given a year of training in Esperanto and then introduced to French are much more likely to succeed in French, for they have begun with a rationally planned language which is easier to learn and yields more satisfactory levels of success and accomplishment. Like the Lyons C clarinet, it does not become redundant, but rather continues to be useful. Esperanto also functions quite like the 'real thing' e.g. French, Japanese." I also proposed to write a short article about these fascinating parallels.

To my great surprise, the e-mail message which I received in response was written in Esperanto! Lyons wrote:

"Kara sinjoro Sloper,

Mi ne jam konsideris la paralelojn inter mia klarineto kaj esperanto, sed tiuj kiujn vi menciis estas ekzaktaj. Mi bonvenigus vian proponitan artikolon, sed bv. inkluzivi mian ret-adreson www.firstclarinet.com

Konfeso:

Mi ne estas Esperantisto, sed amiko-muzikisto estas samideano kaj tradukis por mi.

Kore salutas,

Graham Lyons"

After recovering from the shock of the pleasant and unexpected language-shift, my interest and enthusiasm were yet further piqued, so I looked around a bit more through the information and testimonials etc.

Elsewhere on the website, Lyons writes "There are pockets of enthusiastic teachers who are achieving amazing and literally unprecedented progress on my clarinet with their pupils. But many teachers are still a little scared of it." Again there is a strong parallel with our experience teaching Esperanto.

Lyons is optimistic about the future: "My clarinet has not yet achieved its full potential, but it's just a question of time. It took 15 years for recorders to be accepted as a standard instrument in early music education. Can you now imagine a Primary school without recorders?" Perhaps some time in the future, after the international language is accepted as a standard introduction to language-learning, we will be able to say "Can you imagine a school without Esperanto?"

Miko SLOPER (Berkeley CA)




Hastur Music aperigis en 1994 KDon kun brua muziko sub la titolo *gherkin – ten esperanto love songs*. Se la produktintoj limiĝus uzi Esperanton nur kiel simplan vorton en la titolo, mi eble menciis ĉi diskon pli pozitive. Malfeliĉe, ili decidis montri siajn Esperantajn (ne)konojn, kun rezultoj, nu, ne nur ridindaj, sed ankaŭ nekompreneblaj. Jen specimeno: "Ĉi tio estas unika kaj historia albumo tiris el la formdona noktokluba jaroj pri gherkin, kiu vestis simila birdotimigiloj, aro sin sur fajro dum prezentadoj." Feliĉe, dadaismo ne ĝenas min. (I.O.)

Recenze

Lingva arto: jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Vilmos BENCZIK (red.). Rotterdam: UEA, 1999. 217p. 210x145. Broŝurita. ISBN 92 9017 064 6. Kodo: LIN001, prezo: \$20.80

Jubileaj kompendioj estas sufiĉe oftaj en Esperantujo. La plej frua en mia posedo estas la “Arĝenta duopo”, celebranta la 25-jaran esperantistecon de



Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy; mi havas ankaŭ la (iom malpli ampleksan) sekvaĵon “Ora duopo”, pri la samaj du personoj. Unu el miaj komencaj Esperantaj libroj estis la “Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro”, aperinta tuj post la centjara jubileo de la naskiĝo de L. L. Zamenhof; kaj simile aperis, 28 jarojn poste, “Jubileo”, por la centjara festo de la apero de la lingvo Esperanto. Atentinda estas ankaŭ la dika “Li kaj ni” por Gaston Waringhien. Mankas al mi (sed supezeble jam aperis en lastaj jaroj) tiaj verkaĵoj honore al Juan Régulo Pérez kaj Reinhard Haupenthal, el kiuj ambaŭ forte kontribuis (rilate Haupenthal’on, -as) al la disvastigado de la Esperanta literaturo. Mi ie aŭdis onidiron, ke aperos tia libro omaĝe al André Albault, kiu – malgraŭ kelkaj ideoj pri kiuj mi forte malkonsentas – certe meritas ĝin pro sia multjara laboro por Esperanto.

Lasta kontribuo al ĉi tiu ĝenro fare de la eldona fako de la Universala Esperanto-Asocio estas “Lingva Arto”, kiu festas la samtempajn 75-jarajn jubileojn de William Auld kaj Marjorie Boulton en 1999.

Kiel en ĉiuj tiaj libroj, oni ofte preteratentas la jubileatojn, favore al pli ĝeneralaj temoj, kiuj malmulte aŭ neniom rilatas la koncernajn personojn. Kom-

preneble, kelkaj verkantoj lojale traktis la koncernatojn. Gerrit Berveling priskribas la efikon de la poemaro “Eroj” de Boulton je lia persona kredaro. Reginald Jaderstrom analizas komunajn temojn feminismajn en kelkaj el la verkaĵoj de Boulton (grandparte temas pri noveloj el “Okuloj”). Edwin de Kock resumas la vivon kaj interesojn de Auld. Stefan Maul omaĝas la redaktistajn laborojn de Auld kaj Boulton ĉe “Monato” – rimarkindas, ke Auld ricevas mallongan laŭdon, dum la pli granda parto de la artikolo laŭdegas la talentojn de Boulton. Ljubomir Trifončovski dediĉas kelkajn paĝojn al aperoj de artikoloj de aŭ pri Auld en “Literatura Foiro” – temas efektive pri nura bibliografieto, kun remburaj citaĵoj. Aleksander Korĵenkov provizas nin per tre interesa artikolo pri “La mastro de la ringoj” de J. R. R. Tolkien, emfazante la superecon de la Auld’a traduko super aliaj tradukoj (ĉefe ruslingvaj), kiujn li konas. John Wells prezentas rikolton de la literaturaĵoj de Auld kaj Boulton en TTT (tamen la listo estas iom eksdata, ofta afero en la reto, kaj cetere ne mencias la diversajn enretajn tradukaĵojn faritajn de tiuj du). Laŭlum proponas longan poemon omaĝan al Boulton kaj Auld, kaj Humphrey Tonkin diskutas la ŝekspiraĵon “Epifanio” pere de la traduko de Auld (li iom diskutas, tiurilate, ankŭ la tradukon de “Komedio de eraroj”, al kiu kontribuis ankaŭ Auld).

Mi devus menciĝi ankaŭ la artikolon de Manuel de Seabra, pri “La infana raso”, en la antaŭa alineo, sed fakte ĝi traktas (ĉefe rilate al Auld) la temon de intertraktado inter niaj verkistoj kaj nia publiko, kiun – sen difinita rilato al Auld aŭ Boulton – diskutas ankaŭ Tacuo Hugiĝimoto; do la du artikoloj estas kune menciindaj, kvankam nur unu el ili vere rilatas al la jubileatoj.

Kaj ekzistas amaso da artikoloj, kiuj diskutas la lingvon kaj nur supraĵe aŭ tute neniel mencias s-anojn Auld kaj Boulton. Geraldo Mattos, ekzemple, longe diskutas la ĝustan tradukon de la itala aforismo “traduttore—traditore” (tradukanto—perfidanto); en tiu diskuto iom periferie rolas Auld (kiu ie citis la konatan “traduko—trukado” de Reto

Rossetti). Nu, tiu artikolo estas eble pli trafa ol la polemika “La alternativo” de Werner Bormann, kiu sukcesas lastapaĝe enŝovi la nomon de Auld (kiu mem siatempe verkis sufiĉe da polemikaj esoj pri Esperanto por meriti pli grandan mencion), aŭ “Semado sur la verspado”, en kiu ĉina poeto Mao Zifu proze kaj poezie aŭtobiografias sen ajna mencio de la jubileatoj.

Inter la aliaj artikoloj, legindaj (pro diversaj kialoj) estas tiuj de Vilmos Benczik, kiu diskutas la eventualan influon de la skriba lingvaĵo je la modernaj parolaj lingvoj, ne nur en Esperanto; Jorge Camacho, kiu defendas almenaŭ kelkajn neologismojn (sed kies difino de la vorto “neologismo” ne tute kongruas kun la mia); Paul Gubbins, kiu komparas la Berlinojn de “Metropoliteno” kaj “Kiel akvo de l’ rivero”; Abel Montagut, kiu diskutas netradiciajn funkciojn de lingvoj; kaj Giorgio Silber, kiu iom adresas la saman temon por pravigi siajn movadpolitikajn ideojn.

Utilaj por kompletistoj estos la bibliografioj pri la verkaĵoj de Auld kaj Boulton, kompilitaj de Christian Cimpa*. Fine de la libro estas interesa biografietaro pri la kontribuintoj.

Se interesas vin la lingvo, la movado, la literaturo, kaj – ĝis iu grado – la personoj de William Auld kaj Marjorie Boulton, la libro meritas vian atenton.

*Por interesitoj, preskaŭ la plena originala poemaro de William Auld haveblas en la unuvoluma “En barko senpilota”, kiun Edistudio aperigis antaŭ 13 jaroj. Ĝis nun, mankas tia kompilaĵo por Marjorie Boulton.

Don HARLOW (Pinole CA)

Bonvolu memori ke ĉiuj mendoj senditaj al ELNA devas esti antaŭpagitaj. Por ĉiuj mendoj de varoj necesas pagi ankaŭ sendokostojn. Nur varoj sendataj al kaliforniaj adresoj estas impostendaj, dum la servoj ne estas imposteblaj, sendepende de la klienta adreso. Por pliaj informoj, bonvolu rigardi nian ĉi-jaran librokatalogon.

75 jaroj, William AULD. *Jekaterinburgo: Sezonoj*, 1999. 47p. 195x145. Broŝurita. Kodo: SEP006, prezo: \$4.60

75-jariĝo estas sufiĉe granda atingo por homo. Aldone al la multaj omaĝoj al William Auld, nia honorato tion atinginta, el lia propra plumo (tajpilo? komputilo?) venas ĉi tiu mallonga sed informoplena verko.

En Prefaco li klarigas (per citaĵo el alia verko), ke “la internacilingva publiko” fakte ne havas grandan intereson pri sia literaturo, nek pri siaj verkistoj. Sed li ja timas, ke post lia morto iu trafos detalajn de lia vivo, ellaboros (mis)konkludojn kaj anoncos “profesore al furor-avida publiko”, ekz. ke “[k]vankam li aspektis tre vira, lia edzino lin ofte batis”. Povus okazi ankaŭ, ke eventuala biografisto miskomprenos liajn poemojn, ne sciante ke li estas “observanto, ne partoprenanto”. La originalo en la poemo Anna, ekzemple, ne estas vera persono kiun li vizitadis, sed nura simbolo.

Do, eĉ se li ne opinias la propran vivon sufiĉe grava aŭ interesa por Esperanta legantaro, pro trijara “sieĝo” de sezonisto Aleksander Korĵenkov li finfine konsentis produkti la jenan verketon.

La aŭtobiografia teksto estas stile simpla, rekta, esence sen fanfarono. Priskribante la propran vivon, Auld alternadas inter la esperantista kaj la alifaceta. Ni ekscias, ke Auld havas fratinon proks. ok jarojn malpli aĝan. Pro tiugrada aĝ-diferenco, ili estis “kvazaŭ du sol-

infanoj” al kiuj mankis komunaj intereso-
soj. Tia fakteto pri naskiĝ-ordo kaj familio-grandeco eventuale havas signifon kiam oni provas tutkompreni amikon, konaton aŭ famulon. Ni ekscias ankaŭ, ke li “estis kapabla sportisto ekde tre juna aĝo”. Ni trovas inter gravaj verkistoj tiujn sen elstara korpa lerteco kaj ankaŭ tiujn kiuj ja havas kapablon kaj korpan kaj mensan. Ĉu ĉi lasta speco estas pli integra, tuteca? Ni diru ke almenaŭ por ĉi tiu homo la integriĝo ja ne estis malavantaĝo. (Ĉu pro tio li dum tiom multaj jaroj havas la eltenivon esti vorema leganto kaj fekunda verkanto?)

Post la dua mondmilito, Auld aniĝis al glasgovaj Esperanto-grupoj neŭtrala kaj laborista. En ĉi lasta oni ne permesis uzadi la anglan lingvon. Sub la influo de la grupo kaj ties ano Reto Rossetti, Auld kaj amiko/kunlaboranto John Francis decidis mem ne plu uzi la anglan inter si. (Tiuj, kiuj krokodilemas, precipe ĉe eklaciĝo, pripensu!)

Jen aliaj specimenaj sciigoj kaj opinioj diversloke en la libro:

– p. 19: Kio mankas al Esperantujo? Mankas iu “centrismo” kaj reala internacieco en la pensado. La federacia strukturo de UEA “apogas la paroĥismon”, kiu aktivigas ekz. ĉe esperantistoj skotaj, francaj, nederlandaj.

– p. 22. La lastatempan tradukegon *Mastro de l' Ringoj*, li opinias iasence sia “ĉefplenumo”. La lingvaĵo ne estas “malfacila”, kiel pensas iuj alilandanoj. Fakte, “ĝi estas bele klasika angla stilo, kiu bele konvenas al esperantigo”.

– p. 23. Liaj plej ŝatataj Esperantaj ver-

koj (kiujn li volonte relegas) estas *Metropoliteno* (Varankin), *Hura!* (Baghy), *Infanoj en torento* (Engholm). Liaj plej ŝatataj poetoj estas Boulton, Kurzens, Adamson.

Inkluziviĝas trideko da poemoj originalaj kaj tradukitaj, kiujn li mem elektis por ĉi tiu libreto: pluraj estas sufiĉe famaj, aliaj ne. Ĉiu meritas (re)legon okaze de la enmaniĝo. Unu estas *Ebrio*, kiun ĉe la apero kaj dum multaj jaroj oni taksis ege amuza kaj laŭtleĝinda. Tamen en nia plej aktuala epoko multaj pensas ĝin ofenda kaj malkonvena al la seriozeco de alkoholismo. Do jen ĝi aperas por via privata lego kaj (re)takso.

Troviĝas ankaŭ 16 fotoj kun pozoj formalaj kaj neformalaj, kio helpas bildigi la familianojn kaj aliajn proksimulojn. Kaj fine kvarpaĝa Bibliografio kiel eventuala kontrolo pri verkoj legitaj kaj ankoraŭ leg-endaj.

Mi jam legis mezkvante multon el la originala kaj traduka verkaro de William Auld. Ankoraŭ restas multe pli. Li ankaŭ gvidadis min en la legado de aliaj beletraĵoj, ekz. per sia Baza Legolisto de 51 volumoj (1988) kaj ties suplemento (1997). Mi neniam havis okazon renkontiĝi kun Auld vid-al-vide. Sed en la pasinta jardeko li dufoje respondis al leteroj miaj. Tiujn respondojn mi konservas kvazaŭ ili venus de usona poeto Robert Frost, ĉar mi taksas nian propran laŭreton je simila nivelo. Mi trovas la libron oportuna resumo kaj klarigilo pri liaj vivo kaj pensoj.

Reg JADERSTROM (Mililani HI)

Menciinde

At the 48th ELNA Convention in Atlanta (May 18th – 21st), the International Society of Friendship and Good Will (ISFGW) awarded Certificates of Commendation and Recognition to the following: Jimmy Carter, the 38th President of the United States; Former First Lady Rosalynn Carter; Dr. Claude Piron of Switzerland; William Auld of Scotland; Andrzej Pettyn of Poland; and David B. Richardson and Michael J. Sloper of the

United States. The awards were presented by Dr. Stanley J. Drake, president of ISFGW since 1982. David B. Richardson was awarded a Certificate of Commendation and Recognition for his outstanding book, *Esperanto – Learning and Using the International language*, and for his contributions to the Esperanto movement. Michael J. (Miko) Sloper was awarded a Certificate of Commendation and Recognition for his meritorious service as Director of ELNA's Central Office for the past seven years and for his contribution to


the Esperanto movement. (Stanley J. DRAKE, Atlanta GA)

La unua simfonio komponita speciale por Esperanta teksto prezentiĝos por la unua fojo al la publiko la unuan semajnon de oktobro en la moravia urbo Olomouc (Ĉeĥio). Samokaze ĝi registriĝos por posta eldono KDe. Por pliaj informoj kontaktu la komponinton: David Gaines, 21274 Smokehouse Ct, Ashburn VA 20147; ☎ 703/723-1777; ✉ davegaines@aol.com.

Adiaŭon al James Boggs (Salinas CA), mortinta antaŭ nelonge.

Magic writing on the wall

During the just-completed summer intensive Esperanto courses at San Francisco State University, the students were greeted with an amazing manifestation of public use of Esperanto. The curators of the Yerba Buena Center for the Arts decided to decorate their three-storey theater building with "word art" submitted by six different artists. The theme of the project is "interconnectivity and global communication" so the use of Esperanto was an obvious choice. The panel shown in the picture is the most prominently visible of the six, as it faces a large popular park and a multiplex of film theaters. Actually the inclusion of this Esperanto poem had nothing to do with the S.F. State program: it was only a happy coincidence. Hundreds of thousands of people will be exposed to this highly visible manifestation of the international language during the coming several months of the exhibition. Soon after its appearance the San Francisco *Chronicle* printed a review of the exhibition which included the lead paragraph "People will undoubtedly be puzzled by some of the pieces written in big black letters across the fly tower of the theater at Yerba Buena Center for the Arts. Not everyone, after all, is fluent in Esperanto or the lyrics of



John Lennon." Later in the review, the author refers to "the small explanatory text that, among other things, will translate Stephanie Syjuco's piece. With a lovely ironic touch, she composed an ode to the Internet in Esperanto, the hoped-for universal language that almost nobody speaks. 'By means of our flying buses,' it says 'you will reach any part of the world.' After seeing the piece, the director of local Esperanto League emailed the center to say thanks." The director and several dozen other "almost nobodies" sent letters objecting to the condescension and misstatement in the review. Several days later, the *Chronicle* printed a fine letter from ELNA member and SFSU student Tim Westover which corrected the error and included ELNA's contact information. Quite a few people telephoned the CO and/or visited the website as a result of Tim's letter, so "all's well that ends well"!

Miko SLOPER (Berkeley CA)

Leteru!

István LAJCSÁK, Borisa Kidriča 41, YU-23333 Majdan, Jugoslavio, 30-jara E-komencanto (edzo kaj patro) deziras korespondi pri diversaj temoj.

Ayeni Ayodede Olabode, PO Box 3448, Agege, Lagos State, Niĝerio, universitata sociologo ŝatus korespondi por altigisian E-nivelon.

Menciinde

Provante testi la atenton de la legantoj de *Esperanto USA*, la presisto iom rearanĝis la paĝojn de la antaŭa numero. Li faris tion sen nia aprobo, kaj ni estis same konfuzitaj kiel vi. Niajn sincerajn pardonojn al niaj legantoj.

Pro rapidemo flanke de la kompilintoj de la ĉi-jara *Membrolisto*, el la listo de estraranoj kaj komisiitoj forfalis la komisiito pri testamentaj aferoj, William R. Harmon, kaj la komitatestro de la rimedia komitato, Mark Lambert. Ni pardonpetas pro la eraroj.

Ekde la unua de aŭgusto ĉi-jara, la nova estro de la investa komitato estas D. Gary Grady.

KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) havas novan peranton en Usono: Jerald VEIT, 3578 S Taylor Av, Milwaukee WI 53207; ☎ 414/482-8903; ✉ jveit@execpc.com.

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Permit #1040
Leesburg, FL
34748